
Dep. legal: BI-1007-88

GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

NIA PONTO

Barrencalle Barrena, 7 - 1.°
Telefono 416 44 92
48005 - BILBAO

3a jaro Decembro 1989 Numero 17-18 (5-6)



Ajuntament de Sabadell

Monumento al D-ro Zamenhof en SABADELL

(paĝo 8)

SABADELL
Monumento al D-ro Zamenhof. Ĝi estos inaŭgurata la 17-an de decembro 1989 en la loka Bulvardo lianoma. Municipo de Sabadell. Urbana Komisiono.

GRUPAJ NOVAJOJ

RENOVIGO DE NIA BIBLIOTEKO. - Ne temas pri la meblo kie kuŝas kaj dormas nia grava libraro, sed pri la libroj mem. Antaŭ -- kelkaj semajnoj, estis komencita profunda revizado de ĉiuj ek zempleroj, samtempe profitata por malfermi registrolibron, kaj klasifiki la diversajn volumojn. Al ĉio-ĉi fine sekvos enmetado de ĉiuj datenoj en komputilo.

Kiam post 3 aŭ 4 monatoj la laboro estos finita, eblos -- pli decan servon al niaj legantoj (bedaŭrinde ne multnombraj).

Ni ne devas forgesi ke la libraro de nia Grupo estas ĝia plej granda trezoro, tiel pro la nombro da libroj kiel pro la malofteco de kelkaj el ili, tre antikvaj kaj eble unikaj.

Kaj por faciligi nian laboron, jen ni lanĉas peton al vi, kiu havas en via hejmo librojn apartenantajn al nia aboco: -- Bonvolu redoni, kiel eble plej baldaŭ, la librojn forprenitajn el nia biblioteko!

★★★★★★★★

ONI SERĈAS NOVAJ ESTRARANOJ! - Kiel sciate de vi, je la komen co de la nova jaro, okaze de la ĉiujara ĝenerala kunveno, nia estraro devos parte renoviĝi; Prezidanto, kasisto kaj la du - voĉdonantoj, laŭstatute, devos forlasi siajn postenojn, en -- kiuj ili restis unu plian jaron pro la 49-a H.K..

Niaj homaj fortoj dividiĝas en du grandaj grupoj: Tiuj -- kiuj jam emeritiĝis kaj tiuj kiuj ankoraŭ estas tro junaj por havi stabilan pozicion en sia vivo; bedaŭrinde, mankas tiuj - mezaĝuloj, kies ŝultroj, ĝenerale, elportas la ĉefrespondecon en la diversaj organizaĵoj, jen politikaj, jen kulturaj, jen sportaj, ktp.

Estas malfacila situacio sed ĝi sola estas, tial ni devas ĝin alfronti kaj pensi pri miksaĵo de ambaŭ grupoj en la nova estraro.

★★★★★★★★

LOTERIA DE NAVIDAD. - Os recordamos que el número jugado ŝste año es el 05634 y que el último día de venta será el domingo 17 de Diciembre, no haciendose reservas para nadie.

********** Zamenhofaj Festoj **********

Okaze de la naskiĝdatreveno de la kreinto de nia Internacia Lingvo (15-a de Decembre), jenaj aktoj estas organizitaj:

Sabaton 16-an de Decembro: (vespere)

6,30 h: Projekcio de videobendo pri la 49-a Hispana Kongreso.

8 h: Lunĉo (Bonvolu alporti manĝaĵojn, kiel kutime, el via hejmo).

Dimanĉon 17-an de Decembro: (matene)

12,30 h: Muzik-aŭskultado.

2 h: Komuna tagmanĝo en nemultekosta restoracio de Bilbao. (Proksimuma prezo: 1000 pesetoj/persone.)

NIAJ KURSOJ.

Preskaŭ jam finis nian oktobran elementan kurson, kiun ĉeestis 20 lernantoj, kaj almenaŭ dek sukcese finos ĝin. Sed ni jam planas tiun de Februaro, kaj por ĝin propagandi januare ni petas vian kunlaboron, ĉar kvankam kutime ni ankaŭ radie kaj ĵurnale anoncas ilin, finfine -preskaŭ ekskluzive- nur la afiŝa -surstrata- propagando montras sin efika.

Ankaŭ dum la kvar januaraj dimanĉoj ĉe la Nova Placo kaj same por anonci la kursoj ni aranĝos standeton kun E-revuoj, libroj -- kaj muziko.

Se vi pretas kunlabori, kontaktu la Sekretariejon.

Kiel vi scias (vd. NIA PONTO n-ro 10) VIVI EN EUSKADI estas propaganda videobendo pri nia lando eldonita de la Vaska Registaro, kiu laŭ nia sugesto tradukiĝis ankaŭ esperante. 40 ekzemp., kaj laŭ interkonsento kun la V.R., ni jam disdonis senpage -kaj post peto- al E-organizaĵoj ce le al diskonigo de nia lando kaj kulturo.

Dankleteroj kiuj ni petis kaj ricevis ni transdonos poste al la V.R. kiel fakta pruvo de tiuj praktikaj uzoj kiuj nia lingvo ebligas.

Ĉi-sekve du el tiuj dankleteroj; ni elektis du landojn kaj lingvojn sufiĉe nekonataj.

ESPERANTO-SOCIETO (MALTA)

FONDITA EN 1961
IMWAQQFA FL-1961
ALIGINTA AL LA "UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO" EN 1978
MEMBRU TA' L-"UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO" FL-1978
P.O.B. 142, VALLETTA, MALTA.

Valletta, la 8-an de novembro 1989.

Estimata Prezidanto,
Estimataj samideanoj:

Kun granda ĝojo ni ricevis vian videobendo pri Vaskolando "Vivi en Eŭskadi". Ni deziras kore danki vin pro ĝi. La videobendo ni rigardos dum speciala kunveno de nia Societo, al kiu ni invitos ankaŭ kelkajn ekstermovadanojn. Via estas certe bona ideo por disvastigi la konon de via lando kaj la kulturo de via popolo pere de nia lingvo Esperanto.

Ankoraŭfoje dankon al Vi kaj la Vaska Registaro.

Samideane via,

John Vella-Bondin

(John Vella-Bondin, Sekretario)

(en la malta lingvo)

Eghziez Hbieb,
Ghaziz President:

B'ferh kbir nixtieq ngharrfek li rcevejna il-Video dwar Vaskoland "Vivi en Euskadi". Ta dan nixtiequ bil-qalb kollha nizzukhajr. Dan il-video behsiebna nuruh waqt laqgha specjali ghall-membri, li ghaliha se nistiednu wkoll lill xi barranin. Din kienet idea tassew tajba taghkom biex ixxerrdu t-taghrif dwar pajjizkom u l-kultura ta' nieskom permezz ta' l-ilsien taghna l-Esperanto.

Mill-gdid nizzukhajr lilek u lill-Gvernx Vask.

Dejjem tieghek,

John Vella-Bondin

(John Vella-Bondin, Segretarju)

ČESKÝ ESPERANTSKÝ SVAZ
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO
Jilská 10, 110 01 PRAHA 1

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1.°dcha
48005 B i l b a o

Č.JEDN. 1303/89-zp VYŘIZUJE Pluhař PRAHA 1989-10-17

VĚC P o d ě k o v á n í

Vážení přátelé,

včera jsme obdrželi Vaši videokazetu "Vivi en Eŭskadi". Tímto dopisem Vám chceme vyjádřit naše díky za tento krásný dárek. Videokazeta pomůže přiblížit našim členům Vaši krásnou zemi - Baskicko - a doufáme, že je i prvním krokem ke sblížení našich esperantských organizací.

Ještě jednou srdečné díky!

D a n k e s p r i m o

Estimataj geamikoj,

hieraŭ ni ricevis vian videobendon "Vivi en Eŭskadi". Per tiu ĉi letero ni volas esprimi niajn dankojn por tiu bela donaco. La videobendo helpos alproksimigi al niaj membroj vian belegan landon - Vaskolandon - kaj ni esperas, ke ĝi estas ankaŭ la unua paŝo al la alproksimiĝo de niaj Esperanto-organizaĵoj.

Ankoraŭfoje elkorajn dankojn!

ČESKÝ ESPERANTSKÝ SVAZ
Jilská 10
110 00 PRAHA 1

Ing. Petr Ch r d l e , CSc.
předseda ČES
prezidanto de ČEA

TELEFON 220262 | BANKOVNÍ SPOJENÍ SBČS Praha 2, č.ú.3330-021 | IČO 443034

ESPERANTE ***



Oni rigardas la prezentajojn de koreaj tradiciaj artoj.

INTERNACIA LINGVO-INTERNACIA MOVADO. ... jes ĉar kvankam certe plimulto da esperantistoj eŭropanoj estas kaj la eŭropa E-Movado plej bone fartas laŭ organiza kapablo kaj homfortoj, neniam nur eŭropa restis - Esperantujo.

Malgraŭ ŝajna eŭropeco (almenaŭ laŭ vortdeveno, ne tiom gramatike) Esperanton dekomence alpropiigis internacia -tutmonda- samideanaro, kaj tiel videble -- restas hodiaŭ.

Tre bone ilustras tion la nunaj E-Movadoj en Ĉinio, Japanio kaj Koreio(Suda Koreio); ne hazardo estas ke la plej - bela esperanta revuo ("El Popola Ĉinio") eldoniĝas en Ĉinio, ke unu el la plej aktivaj E-eldonejoj estas "Ĉina Esperanto-Eldonejo, same ne hazardo estas ke unu el la plej -- multnombraj naciaj grupoj ĉe la Universalaj Kongresoj estas la japana. Ne hazardo, sed rezulto de multjara esperanta - agado de niaj aziaj gesamideanoj, kiuj tiel, sukcese pligravigis la azia flanko de nia Movado.

Kvankam pli juna, la korea E-Movado ankaŭ estas - rimarkinda; historie la Internacia Lingvo venis al - Koreio, antaŭ pli ol 70 jaroj, el Ĉinio, el Ruslando kaj precipe de koreaj studentoj lernintaj ĝin en Japanio; la unua korelingva lernolibro aperis en 1.921 (Tokio), kaj jam en 1924 - estis fondita Korea Esperanto-Instituto kiu ekeldonis en 1925 la revuon "La Orienta Lumo" poste "Korea Esperantisto". Esperanto-Korea vortaro - aperis nur en 1964. Tiel kiel la historio de la korea nacio same akcidenta estis tiu de la korea E-movado. Normaligo nur okazis post la jaro 1965. La nuna "Korea Esperanto-Asocio" fondiĝis en 1975 kaj ekde 1976 membriĝas en UEA.



Prezentiĝas korea tradicia arto fare de la tradiciaarta trupo de Univ. Dankook.

Unu el la plej atentindaj ecoj de la korea esperantistaro

제21차 한국 에스페란토 대회

LA 21-A KOREA KONGRESO DE ESPERANTO

1989. 9. 30 ~ 10. 1





Pli ol 350 esperantistoj partoprenas en la kongreso kaj memorfotiĝas.

estas la ekstrema juneco de siaj membroj, pri kiu -- precipe "kulpas" la propaganda strategio de KEA kiu bone prizorgas la diskonigadon de E-o ĉe la universitataj studentoj (jen detalo: en Koreio 48 universitatoj havas E-klubojn).

En 1994 la INTERNACIA JUNULARA KONGRESO okazos en Seulo (Suda Koreio).

Tre bela revuo, esperante, eldonas KEA (pri korea historio, nuntempo kaj tiea E-movado):

"LA ESPERO"
C.P.O. Kesto 5154, Seulo

Se vi deziras korespondi kun koreaj geesperantistoj, nur skribu ĉi-subajn necesajn informojn kaj sendu al la suba adreso.

1) Sinprezento: nomo, adreso, lando, sekso, jaraĝo kaj profesio-fako.

2) Kondiĉoj pri korespondanto en Koreio sekso, limo de jaraĝo, profesio-fako, kaj temo ktp

3) Notu Bone: laŭeble tajpu almenaŭ nomon kaj adreson(se ne eblas, skribu preslitere, klare).

4) Adreso: Korea Esperanto-Asocio
por Koresponda Servo
C.P.O. Kesto 4258
Seulo, 100-642, Koreio

75-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

14-a / 21-a julio 1990, Havano (Kubo).

Estos la dua UK kiu okazos en Latinameriko (Brasília 1981).

Ankaŭ la 46-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO.(21-a / 28-a julio 1990) okazos en Kubo, ĉe Playa Giron, 220 kilometroj for de Havano.

MONUMENTO AL D-ro ZAMENHOF EN SABADELL.


Starigita de la "Comisió Ciutadana Pro-Monument al Dr. Zamenhof" ĝi situas en unu el la precipaj arterioj de la urbo Sabadell, ĝuste en la Bulvardo de D-ro Zamenhof, inaŭgurita la jaron 1912. La Monumento havas la alton de 12 kaj konsistas el kvar metalaj kolonoj, kies simbolo estas: "Esperanto en la kvar kardinalaj punktoj de la mondo". Sur la plej alta kolono staras la verda stelo kvinpinta, kies diametro estas unu-metra.

Ĉe la piedo de la Monumento estoa fiksitaj reliefa vizaĝo de D-ro Zamenhof, kaj ankaŭ memortabulo de tiu grava evento esperantista.

Proksimume la Monumento kostis sep milionojn da ptojn.

Ĝia inaŭguro, al kiu vi ĉiuj estas invititaj, okazos je la 17-a de Decembro tagmeze.


c.j.cela: la familio de pascual duarte



hispana literaturo

Prezo: 750 pesetoj.

Vi ankaŭ trovos ĝin en nia biblioteko.



Camilo José Cela naskiĝis en Padrón, vilaĝeto galega, en 1916, filo de patro hispana kaj patrino brita. Membro de la Akademio de la Hispana Lingvo. Nuntempe la plej konata kaj populara verkisto hispana. Poeto, romanisto, eseisto prelegisto. * Pluraj stratoj de urboj kaj vilaĝoj hispanaj portas lian nomon.

(*) Ĉi-jara NOBELPREMIITO PRI LITERATURO

La apero en 1942 de *La familio de Pascual Duarte* en la sterila kaj dezerta pejzaĝo de la hispana literaturo, konstituis aŭtentan rivelon pro la aŭdaco kaj originaleco de la temo, kaj pro la nude kruda karaktero de la homa klimato, speguliĝanta en ĝiaj paĝoj. Per ili la hispana beletro retraktas la popolan mondon ruran, loĝatan de homoj primitivecaj kaj instinktaj, en kies sovaĝaj pasioj manifestiĝas la praa barbareco de lando penetrata de violento, kaj malamo.

Tradukita de nia samideano Fernando de Diego, membro de la Akademio de Esperanto.

ABONOJ KAJ KOTIZOJ

ABONOJ AL ESPERANTAJ REVUOJ.

LITERATURA FOIRO (dumonata, 52-paĝa).....	3.100 ptoj
MONATO (12 numeroj jare).....	2.950 ptoj
EL POPOLA ĈINIO (12 numeroj jare).....	1.500 ptoj
ESPERANTO (11 numeroj jare).....	2.070 ptoj
KONTAKTO (dumonata).....	1.050 ptoj
(kolektiva abono).....	625 ptoj
HEROLDO DE ESPERANTO (17 numeroj jare).....	1.800 ptoj
HUNGARA VIVO (dumonata).....	1.900 ptoj

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

KOTIZOJ AL ESPERANTAJ ORGANIZAĴOJ.

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO:

- Emerito, junulo kaj senlaborulo.....	1.200 ptoj
- Membro abonanto.....	1.700 ptoj

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO:

- Membro kun Jarlibro.....	1.380 ptoj
- Membro - Abonanto (Jarlibro + ESPERANTO)....	3.450 ptoj

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

KOTIZOJ KAJ ABONOJ PERE DE LA GRUPO ĝis la 22-a de DECEMBRO

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

FELIĈAJN FESTOJN



kaj promesplenan novan jaron
deziras al vi ĉiuj
NIA PONTO !!

Humuro

Dum ekzameno...

- Ĉarma junulino estas vane demandata pri mitologio de epopeoj.

- Bonvolu diri al mi fraŭlino almenaŭ tion, kiu estis la unua viro?

- Pardonon, sinjoro profesoro -indignas ŝi ruĝvizaĝe - tio estas ja mia privata afero, aŭ ne?

&&&&&&&&&&&&&&

Nekredeble?

- Kion skribis tiu postulema ulo en la gastlibro? - demandas la ĉefkuiristo la kelneron.

- Nenion - eĉ ne unu vorton. Sed la stekon li gluis al gastlibro.


&&&&&&&&&&&&&&

En la oficejo.

- Nu, fraŭlino Nikoleta, ĉu vi estas kontenta pri via situacio?

- Ĝenerale jes, sinjoro direktoro. Sed la cindrujo premas iom mian dorson...

&&&&&&&&&&&&&&



MONATO

... kaj
tamen
ĝi movigas !

Ni invitas vin regali vin mem per

Monato

unika, alternativa, ekskluziva
revuo en la internacia lingvo

pri politiko, ekonomio, kulturo kaj multaj aliaj temoj de la ĉiutaga vivo: revuo por la tuta familio.

MONATO havas 200 kunlaborantojn en pli ol 60 landoj, kiuj raportas originale en Esperanto.



ABONU ĜIN
ĈE NIA GRUPO

(12 numeroj jare)

Jarabono: 2.950 p-toj